

revuo

esperanto

decembro 1967

60-a jaro

n-ro 745 (12)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

LIBRO- TAGO



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 169** 20-jara datreveno de la Universala Deklaracio (Lapenna)
- 170** La araba lingvo en la moderna mondo (Al-Amili)
- 172** Lingva respondo retrovita (R.H.)
Iom pri la tajpitaj tradukoj de Zamenhof (Delcourt)
- 174** Recenzoj
Citaĵo
- 175** CED: Tradukoj en Esperanto
Recenzo
Ricevitaj eldonaĵoj
- 176** Mallonge
- 177** 53-a Universala Kongreso, Madrid, 1968
Esperanto en radio
- 178** La Juna Vivo
- 179** Nekrologoj Peterson, Loth
Oficiala informilo n-ro 407
La internaciaj konkursoj 1967
- 180** Anoncetoj

kovrila bildo

Laŭ malnova tradicio la 15-a de decembro estas la Tago de la Esperanta Libro. Sur la bildo: hungaraj Esperanto-eldonaĵoj vendataj en klubo en Budapeŝto. (foto: Paŭlo Kristek)

bildojn liveris

- 173** Marcel Delcourt

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj. Unuopa numero: 1,— gld.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj: 0,45 gld. aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en ĉ. 80 landoj

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj kaj kulturaj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Mddx, Britujo.
S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto kaj estrarano pri administrado, Postbus 412, Eindhoven, Ned.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado, D-6653 Blieskastel, Alter Hangarten 4, Germanujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 de Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk 1, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

D-ro Peter Zlatnar, estrarano pri kongresoj, Rimska 7/II, Ljubljana, Jugoslavio.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro Ulrich Lins, D-5 Köln-Dellbrück, Germanenstr. 146, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: (01) 904 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, 8057 Zürich, Svislando.

oficiala organo de universala esperanto-asocio

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

esperanto
decembro 1967

Parizo generis aŭ atestis multajn mondoskualajn eventojn. Unu el ili, verŝajne la plej grava, estis la heroa Revolucio, kies aspirojn formulis kaj leĝigis la glora Deklaracio pri la Rajtoj de la Homo kaj Civitano, proklamita de la franca Konstitucia Asembleo en aŭgusto de la jaro 1789.

En tiu sama Parizo la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis la 10-an de decembro 1948 per ĉiuj voĉoj kaj kelkaj sindetenoj la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj. Eĉ ne unu voĉo estis esprimita kontraŭ la Deklaracio. La delegacioj, kiuj ne voĉdonis, eksplicite sian pozicion: ili sindetenis ne tial, ĉar ili malaprobis kiun ajn eron, sed tial, ĉar la Deklaracio, laŭ ilia opinio, ne entenas sufiĉe da rajtoj kaj liberecoj.

La momento estis solena kaj emocia. La subskribinto havis la privilegion ĉeesti ĝin kaj enspiri la atmosferon de kontento, ĝojo kaj speroj, kiujn la evento pravigis. Por la unua fojo en la historio de la homaro difinitaj rajtoj kaj liberecoj estis rekonitaj kiel universalaj, tutmondaj, en jura dokumento de unuaranga signifo.

Ne estas la loko ĉi tie por analizi la Deklaracion aŭ ĝiajn unuopajn partojn kaj artikolojn. Tio estos farita en alia okazo. Sufiĉas nur menci, ke la Universala Deklaracio havas grandan valoron ankaŭ por la Esperanto-Movado. La Internacia Lingvo estas, interalie, esprimo de la ideo pri rasa, nacia, religia kaj lingva egaleco. Tial ĝi povas prosperi nur en kondiĉoj de efektiva respekto al esencaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de la homo. Movado, celanta ĝian disvastigon, ne povas ne subteni almenaŭ morale ĉiujn strebadojn, kiuj kondukas al tiuj favoraj kondiĉoj. Tial UEA, kvankam neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio kaj politikaj problemoj, tamen eksplicite deklaris en sia Statuto, ke la respekto de la homaj rajtoj estas esenca kondiĉo por ĝia laboro. Tio tute speciale rilatas al la principo de lingva egaleco.

UEA ne estas, nek povas esti neŭtrala koncerne tiun demandon. Ĝia neŭtraleco finiĝas tie, kie komenciĝas malobservo de la lingva egaleco aŭ rekta atako kontraŭ la Internacian Lingvon, kiu, krom senfinaj praktikaj avantaĝoj, prezentas la sole eblan justan rimedon kontraŭ la malegaleco sur tiu kampo en internaciaj rilatoj.

En 1968 en la tuta mondo estos celebrata la 20-jara datreveno de la Universala Deklaracio. U.N.E.S.C.O. invitis ĉiujn neregistarajn organizaĵojn en konsultaj rilatoj partopreni en tiu agado kaj kontribui al la Jaro de la Homaj Rajtoj laŭ siaj eblecoj. La Estraro de UEA akceptis la inviton kaj decidis, ke la Asocio partoprenos en la celebrado per aparta programo. Ĝi enhavas jenajn erojn: esploroj kaj dokumentaro pri la lingva diskriminacio sur internacia kaj nacia niveloj; pritrakto de la homaj rajtoj en unu sekcio de la 53-a Universala Kongreso en Madrid; almenaŭ unu prelego pri la homaj rajtoj en la programo de la Internacia Somera Universitato en Madrid; temoj pri pluraj homaj rajtoj por la Oratora Konkurso en 1968; prelegoj kun diskutoj pri la homaj rajtoj dum la landaj kongresoj kaj en la lokaj societoj; artikoloj pri la homaj rajtoj, unuavice pri la lingva diskriminacio, en la internacia kaj nacia gazetaro; dua eldono de la Universala Deklaracio en Esperanto kaj kiel eble plej vasta distribuo de tiu dokumento; eldono de memoriga glumarko; aktiva partopreno de la reprezentantoj de UEA, de ĝiaj landaj kaj fakaj organizaĵoj, aŭ de iliaj lokaj grupoj en ĉiuj aranĝoj organizitaj de U.N.E.S.C.O. aŭ de aliaj instancoj sur internacia, nacia kaj loka niveloj.

La preparlaboroj por plenumo de tiu programo estas jam finitaj. La dua eldono de la Universala Deklaracio en Esperanto estas presita kaj la memoriga glumarko kun taŭga teksto aperos post nelonge. La Centra Oficejo prizorgas la distribuon.

Aparte menciinda estas la plano de temoj, kiujn prilaboros la Centro de Esploro kaj Dokumentado en ligo kun la unuopaj artikoloj de la Universala Deklaracio. La plano antaŭvidas, interalie, pritrakton de jenaj demandoj: internaciaj konvencioj kaj dokumentoj, kiuj montras la universalecon de lingvaj rajtoj; lingva diskriminacio ĝenerale kaj lingva imperiismo en la mondo kaj en la kadroj de unuopaj landoj (asertoj pri lingva supereco, subpremo de malgrandaj lingvoj); difino de "nacia minoritato"; oficialaj lingvoj en internaciaj organizaĵoj kaj naciaj parlamentoj; persekutoj kontraŭ Esperanto-organizaĵoj, Esperanto-eldonaĵoj, korespondado k.s.; persekutoj kontraŭ organizaĵoj de minoritatoj; neglektado de diskriminacitaj lingvoj en edukado kaj diskriminacio kontraŭ Esperanto en edukado. La rezultoj de tiuj esploroj aperos en formo de dokumentoj de CED aŭ artikoloj en la periodaĵoj de U.E.A. La plej gravaj el ili estos publikigitaj en la nova revuo "La Monda Lingvo-Problemo", kies unua numero aperos la 10-an de oktobro 1968, do la tagon mem de la 20-jara datreveno, kiel krono de ĉiuj atingoj en 1968.

Superflue diri, ke la plena realigo de la programo kaj ĝiaj pozitivaj sekvoj dependas ne nur de la centraj organoj de UEA, sed de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, el kiuj konsistas la Asocio. Nur la aktiva kunlaborado de ĉiuj garantias plenan sukceson. Nur tiamaniere la Esperanto-Movado povos efike kontribui al ĝenerala progresigo de la homaj rajtoj en la mondo kaj samtempe fortikigi la poziciojn de la Internacia Lingvo inkluzive ĝian pli vastan aplikon en la internaciaj rilatoj.

Ivo Lapenna

esperanto
decembro 1967

LA ARABA LINGVO

EN

LA MODERNA MONDO

LA RAJTO LERNI PER LA GEPATRA LINGVO

Ĉi-jare la araba mondo festas datrevenon aparte interesan por studantoj de la monda lingvo-problemo kaj aparte aktualan en ligo kun la Jaro de Homaj Rajtoj 1968, por kiu la preparoj nun jam komenciĝis. Antaŭ 60 jaroj (do ĝuste unu jaron antaŭ la fondiĝo de UEA) komenciĝis la instruado per la araba lingvo en la lernejoj de Egiptujo. Fine realiĝis la rajto de la egiptoj, ricevi klerigon en sia propra lando en sia propra lingvo. Dum preskaŭ kvar jarcentoj, ekde la turka invado en 1517, tiu rajto ne ekzistis.


La ekzemplon sekvis iom post iom la aliaj arabaj landoj. En Sudano, ekzemple, jam de kelkaj jaroj forte antaŭeniras ŝtata programo por la arabigo de lernejoj kaj administrado, kie antaŭe regis la angla. En Alĝerio, aliflanke, nur lastatempe komenciĝis la programo, laŭ kiu oni anstataŭigos la francan lingvon per la araba en la elementaj lernejoj kaj por kiu Sirio sendis helpe 50 instruistojn ĉi-jare.

LA LUKTO DE LA LINGVAJ POTENCOJ

Eble la ĉefa faktoro influanta la pozicion de Esperanto en la mondo estas la strebado akceptigi iujn naciajn lingvojn — precipe la anglan, francan kaj rusan — kiel "internaciajn". Kompreneble, malantaŭ tiaj strebadoj ĉiam sentiĝas politikaj kaj ekonomiaj interesoj. Ĉiuj uzantoj de la Internacia Lingvo havas do apartan kaŭzon atente observi la lukton inter la ĵus menciitaj "grandaj" lingvoj kaj, eĉ pli atente, la graviĝon de aliaj naciaj lingvoj. La daŭre kreskantaj prestiĝo kaj scienca kaj ekonomia graveco de tiaj lingvoj, kiel la ĉina, araba, japana, k.a., devas senteble malfaciligi la pretendojn de la ĉefaj eŭropaj lingvoj.

La araba estas tre bona ekzemplo. Samtempe kiel kreskas ĝia scienca literaturo, ĝia uzado en internacia komerco, ĝia uzado en lernejoj kaj universitatoj, tiel malkreskas en la arabaj landoj la antaŭe reganta graveco de la eŭropaj lingvoj. La nove akirita rajto uzi la araban kiel laboran lingvon ĉe Unesko (vidu "Esperanto", januaro 1967, p. 7) kaj ĝia oftiganta uzo en eldonaĵoj de U.N. signifas plian paŝon kontraŭ la superregado de la eŭropaj lingvoj kaj plian favorigon de la situacio por neŭtrala solvo.

En tiu kadro ni publikigas ĉi-sube la artikolon de s-ro Husen Al-Amili (Bagdad).



La aŭtoro en sia oficejo

La araba estas unu el la semidaj lingvoj kaj el la grandaj kulturaj kompreniloj en la civilizacia historio de la homaro. Per ĝi iam kunfandiĝis la kulturoj de la mezepoka Oriento, kiuj fariĝis tio, kion oni konas kiel la arab-islama civilizacio.

Post la naskiĝo de Islamo en la 7a jarcento, oni arabigis la plejmulton de la Mez-Oriento kaj la tutan Nord-Afrikan, kaj disvastigis la novan religion — de strikta monoteismo de Alaho — malproksimen trans la limoj de la araba mondo. Per kultura etendado kaj komerco, la Kredon oni forportis ankaŭ en la kordon de Azio, ĝis la sud-orientaj limoj de Malajujo tra la insuloj de Orient-Hindujo. Ankaŭ en Hispanujo la araboj starigis brilan civilizacion, kiu radiadis pensadlumojn ĝis la tempo de la matenruĝo de la eŭropa Renesanco.

La ora epoko de la araba lingvo etendiĝis inter la sepa kaj deksepa jarcentoj, kiam la araboj fine devis forlasi Hispanujon.

La araba estas la lingvo de la Sankta Korano. Oni preĝas per ĝi kvin fojojn ĉiutage kaj publike deklamas versojn el la Korano en la Komenco de preskaŭ ĉiuj sociaj kaj festaj okazaĵoj kaj radio-programoj. La ne-arabaj islamanoj (ĉirkaŭ 500 milionoj) egale uzas la araban por religiaj celoj. Krome, la araba al ili estas ankoraŭ granda kultura lingvo, ĉar ĝi enhavas la sukojn de la pensoj de iliaj prapensuloj dum la lastaj 1400 jaroj. La kono de la araba inter intelektuloj estas do signo de respektinda kultura rango en la islamaj landoj.

Kompreneble la araba treege influis la lingvojn de la popoloj, kun kiuj la araboj intermiksiĝis dum jarcentoj. Proksimume unu triono

de la vortaroj de la hispana, la irana, la turka, la kurda, la urdua, la ŝuahila kaj aliaj pli-malpli konsistas el arabaj vortoj. En modernajn eŭropajn lingvojn transmoviĝis, tra araba Hispanujo, miloj da arabaj vortoj de ĉiuj kampoj de civilizacia vivo. La esperantaj vortoj "algebro", "ĥemio", "cifero", "kablo", "admiralo", "atlaso", "trafiko", "alkalo", "alkoholo", "alkemio", "dogano", "musono", "slupo", "limono", "rizo", "sukero", "damasko", "siropo", "zingibro", "teniso", "kafo", "kadio", "magazeno", "ŝako", "tarifo", "ĉeko", "arsenalo" kaj multaj aliaj estas de araba origino.

Ekzistas nuntempe 13 sendependaj arabaj landoj, kiuj nur en la nuntempa generacio gajnis oficialan sendependon. Antaŭe, regadis en la arabaj landoj la turkoj kaj eŭropanoj. Nek tiuj, nek ĉi tiuj zorgis pri la prospero aŭ kulturo de la arabaj popoloj. Kun la epoko de sendependado, la araba revivas kiel la nacia lingvo de la araba mondo, kiun enloĝas ĉirkaŭ 80 milionoj. Tio estas nur unu sepono de la islamaj nacioj, kiuj okupas tersurfakon etendiĝantan ekde la afrikaj atlantikaj marbordoj okcidente al la limoj de la Pacifika Oceano oriente; de la Araba Maro sude al la Nigra Maro kaj Kaspia Maro norde.

La kreskiĝo de la modernaj arabaj naciaj movadoj kaj la rapidaj politika, ekonomia, kultura kaj socia evoluoj en la araba mondo kompreneble metas la araban lingvon en lokon de graveco en la internaciaj kulturaj rilatoj. Pro tio, Unesko decidis pasintjare rekonii la araban kiel unu el siaj laboraj lingvoj.

Muziko, ritmo kaj retoriko

Plue, la araba estas ankoraŭ la ĉefa fonto de plezuro al la araba orelo. Ĝiaj muziko, ritmo kaj retoriko estas preskaŭ la nura intelekta sincera araba arto de nia tempo (krom la voĉo de nia kantistino: Fejruz...). Nacioj, kiuj deziras amikiĝi kun la araboj, devas konstati tiun fakton. Tial, ke ne-araboj ne ĉiam povas bone kompreni la araban parol-stilon, ili ofte miskomprenas la araban menson mem...

La araba mem konsistas el 26 konsonant-literoj, tri vokalliteroj kaj tri aldonaj vokalsignoj (la 3 vokal-literoj precize prezentas la esperantajn sonojn: A, I, U; kaj la 3 vokalsignoj precize prezentas la mallongajn sonojn de A, I, U, kiel en la anglaj vortoj: mAt, bId kaj BUll. La araba estas tiel fonetika, preskaŭ kiel Esperanto mem; kaj dank' al la simplaj manskribaj formoj de la literoj oni skribas la araban (de dekstre al maldekstre) tiel rapide, preskaŭ kiel stenografio. Tion ebligas ankaŭ la fakto, ke ni kutime ellisas la aldonajn tri vokal-signojn, se ni ne timas malklarecon, (se malklareco ŝajnas okazi, tiam oni povas facile streki ilin). La defendo de la ellaso de vokal-signoj — kiu estas la ĉefa kritiko kontraŭ la araba skribo — estas, ke la skribita vorto estas nure BILDO: ĉu oni kunmetas ĝin el literoj de alfabeto (kiel en la araba aŭ la eŭropaj lingvoj), ĉu oni desegnas ĝin laŭ bild-sistemo (kiel en la ĉina). Tial,

leganto efektive ne literumas dum legado, sed nur ekvidas iun bildon aŭ grupon da bildoj-vortoj, kies apartaj formoj rapidege memorigas lin pri la ĝusta elparolado. Tiamaniere, ni kutime ellisas la tri vokal-signojn (krom en klasikaj verkoj aŭ, kiel dirite, kie ajn oni volas precize vokaligi, kaj nur uzas la tri ĉefajn (a-, i-, u-) vokal-literojn.

La araba vortaro kaj gramatiko baze ne ŝanĝiĝis. Multaj malnovaj vortoj tamen ekhavas novajn signifojn, kaj malnovaj signifoj novajn vortojn. La araba estas eble la nura klasika lingvo de nia epoko, kiu transportas, tra jarcentoj, originalajn brilegajn bildojn de plenriĉaj antikvaj kulturoj de multaj popoloj, kiuj fandiĝis aŭ en araban nacion aŭ en la pli grandan islaman komunon. Tiujn bildojn oni ankoraŭ povas facile kompreni kaj ĝui. Unu el ili estas la Korano, kies versoj estas la ĉiutaga spirita nutraĵo por centoj da milionoj da islamanoj en la tuta mondo.

Necesas nun revolucio de konceptoj

La araboj devas plenumi kelkajn radikajn ŝanĝojn, eĉ revoluciojn en multe da siaj konceptoj kaj vivmanieroj por kapabli aliĝi al la spacepoko. Mi opinias, tamen, ke la araba alfabeto, kiun kelkaj araboj vane penis, dum la lastaj 50 jaroj, anstataŭigi per la latina, fakte estas pli ŝpara kaj pli preciza, ol la latina alfabeto kaj la literummanieroj de la eŭropaj lingvoj. Pri la formo, oni lasus tion al apartaj naciaj aŭ individuaj gustoj, sed mi opinias ke ĉiuj alfabetoj povas egale esti bonaspektaj, se klaraj.

Entute, eŭropaj lingvoj kiel la angla, la franca aŭ la germana certe ne estas pli facilaj ol la araba — neniam! Eble la ĉefa malfacilaĵo de la araba estas la ampleksa gramatiko. Ĉi tio tamen baziĝas sur strikta kaj neta regularo.

Nia antikva kulturo grandparte similas antikvan robon brile ornamitan per gemoj kaj perloj. Tiun karegan robon ni heredis de nia praularo. La modo tamen delonge fariĝis malmoderna kaj ĝi nun taŭgas nur pendi en la salono por aperi de tempo al tempo antaŭ gastaro. Nia lingvo tamen ne estas tiu robo. Iu ajn lingvo estas tiu, kiu parolas ĝin. La araba — kvankam en si mem originala ĉevalo, tamen galopas iel, kiel oni rajdas. Nia lingvo portas al ni gloran pasintecon kaj malfermas por ni gloran estontecon. Nuntempe ni tamen luktas re-eltrovi nin mem kaj scii, kiuj ni estas kaj kion ni volas. Tio estas nia ĉefa batalo, kiun ni devas tuj gajni. Tiam nia lingvo kaj aliaj modernaj lingvoj servos al ni por pli bona rango en la monda socio.

Intertempe, ni devas saĝe memori nian klasikan diraĵon, ke, se oni tro zorgas pri la ornamata vorto, tiam oni forgesos pri la esenca penso. Alia forgesata saĝo de nia Korano konsilas al ni, ke "Alaho ne povas helpi iujn, ĝis ili aliigas tion, kio estas en iliaj koroj".

Dank' al la afableco de s-ro Sven Alexandersson, Sekretario de Sveda Esperanto-Federacio, mi ricevis fotokopiojn de 8 leteroj de d-ro Zamenhof al Paul Nylén, ĝis nun neniam publikigitaj. Ĉiuj leteroj estas mane skribitaj (kiel preskaŭ la tuta Zamenhofa korespondado), per tre bone legebla, kvankam rapida manskribo. La unuaj kvin estis senditaj el Grodno, la aliaj el Varsovio.

Ĉi-sube aperas la 5-a letero, pri kiu jam en 1937 skribis Nylén (vd. Ora Libro). — La letero devas esti rigardata kiel unu el la plej fruaj lingvaj respondoj kaj devus esti enprenita en novan eldonon de LR. Samtempe ĝi prezentas ian antaŭformon de PV. Rimarku: — masonpastro; hodiaŭ: mortero. albatilo (= trulo), ŝajne sola uzo ĉi tie; en EV ĝi mankas. La lărobok efektive eliris en 1896, kaj ĝi havis novajn eldonojn en 1898 kaj 1902 (BIL 3097). R.H.

12/II 97

Kara Sinjoro!

Jen ekzemploj pri la vortoj, kiujn Vi skribis: Militestro povas komenci batalon nur tiam, se li povas tute fidi je siaj soldatoj. Al homo nekonata ne konfidu Vian sekreton. — Mi penis atingi tiun ĉi malfacilan aferon, ĉar mi forte deziris ĝin atingi; mi multe klopodadis pri tiu ĉi afero, kvankam efektive estis al mi indiferece, ĉu ĝi estos atingita aŭ ne. — Krakeno estas kun sukero (¹), kringo estas sen sukero. — Absceso estas fermita ankoraŭ tubero kun puso; ulcero estas malfermita vundo kiu pusas kaj ne povas rapide saniĝi; furunko estas malgranda tubereto sur la haŭto, kun iom da enhavo simila al puso. — Kvieteco estas certa eco de karaktero, dolĉeco, de karaktero; trankvila (²) estas ĉiu, kiun nenio ekscitas, indignigas aŭ zorgigas. — Ingveno estas la enprofundiĝo inter la femuro kaj ventro; lumbo — regiono (³) de la korpo, kie finiĝas la dorso kaj komenciĝas la femuroj; kokso — plej supra artikolo de la femuroj (kie la femuroj komenciĝas). —

Kuko estas ĉia speco de franda pano (ekzemple kun sukero, kun konfitaĵo, fruktoj k.t.p.); flano estas speciala speco (maldika plata kuko rostita en butero aŭ io simila). — Roto en diversaj armeoj estas malegalaj. —

Trulo — ĉerpilo kaj albatilo por masonpastro. — Gobio — peco* de fiŝo. — Regi oni povas super ia lando; guverni oni povas ian provincon (trovante sin tamen mem sub ordonoj pli altaj, ekzemple de reĝo) aŭ ian personon; gvidi = montri la vojon; konduki = iri kun (⁴) iu (ekzemple tenante lin per la mano); direkti = turni iun al ia vojo. — Komunumo = kolekto da homoj, prezentanta ian unuon (ekzemple (⁵) vizitantoj tiun saman preĝejon (k.t.p.; aŭ ekzemple kolekto de ĉiuj samreligiaj aŭ samnaciaj (⁶) (fremdaj) en unu urbo); paroĥo = preĝeja distrikto.

Kun kora saluto

Via L. Zamenhof

P.S. Ĉu Via "Lărobok i det internationella språket Esperanto med exempel och öfningar" (N^o 95) jam eliris el la presejo?

¹ unua teksto: dolĉa² trastrekita: povas³ unua teksto: parto⁴ trastrekita: li⁵ trastrekita: hav (versajne fariĝintus: havantoj)⁶ "aŭ samnaciaj" skribita super la linio; sekvas trastrekita "en"

* versajne skriberaro

IOM PRI LA TAJPITAJ TRADUKOJ DE ZAMENHOF

El la diversaj originalaj manuskriptoj de tradukoj de doktoro Zamenhof, kiujn mi posedas, la manuskripto de "La Gimnazio" estas tiu, kiu suferis plej multe da korektoj. Pri-studente ĝin mi provis ekscii, kiel la aŭtoro de Esperanto tradukadis kaj kiajn hezitojn li frontis dum sia laboro.

La manuskripto de "La Gimnazio", same kiel tiu de "La Najtingalo", (kiun aĉetis aŭstraliano sekve de mia oferto en 1959), estis tajpita de d-ro Zamenhof mem per pratipo de skribmaŝino.

Mi ne sukcesis ekscii kun certeco la fabrikmarkon de lia skribmaŝino. Ĉu Hammond, ĉu Oliver? Ambaŭ fabrikantoj liveris skribmaŝinojn kun esperantaj supersignoj, antaŭ ol Yost, en la jaro 1907, ankaŭ reklamis en la gazeto "L'Espérantiste" de Beaufront pri sia skribmaŝino kun esperanta klavaro. Tamen

mi opinias, ke la Doktoro posedis la Yostmaŝinon kun duobla klavaro, unu majuskla, alia minuskla.

La litertipo estas kursiva, kaj larĝa la spaco inter la literoj. La cirkumflekso ekzistas sur ambaŭ klavaroj, kaj por signi la minusklan ĥ, Zamenhof zorge tajpis la majusklan cirkumflekson, tiel ke la ĉapelo ĝuste ĉapu super la litero kaj ne tranĉu ĝin. Aparta klavo ekzistis por la ŭ-litero.

La papero uzita estas laŭ la formato 21 x 32, kaj la meznombro de 36 linioj sur ĉiu paĝo estas proksimume la sama kiel en "La Revuo", kiel ankaŭ la nombro de literoj en ĉiu linio. La tajpita manuskripto de "La Gimnazio" konsistas el 15 paĝoj kun 545 linioj, kaj la teksto en "La Revuo" ampleksas 14 paĝojn kun sume 526 linioj.

(G. J. J. J. J.)

La atenta esploro de la manuskriptoj konvinkis min, ke Zamenhof mem tajpis rekte, sen verko de antaŭa malneto, la frazojn jam konstruitajn en la cerbo. Ŝajne pruvon pri tio liveras la maniero, laŭ kiu estas faritaj la korektoj. Ortografiaj eraroj dum tajpado estas sporadaj kaj ĉiam korektitaj sur la presprovaĵoj. Tion mi povis kontroli, ĉar feliĉe ankaŭ la presprovaĵojn kun la laste lastaj korektoj de Zamenhof kaj lia subskriba permeso mi havas en la mano.

Plej oftaj estas la korektoj, kiuj anstataŭigas vorton aŭ frazeron. Tajpinte frazon, Zamenhof atente relegis ĝin kaj tuj korektis. Tiel, vortoj estas trastrekitaj per bastonetoj aŭ nigritaj per iksoj kaj foje ambaŭ signoj surstampiĝas, kvazaŭ la aŭtoro volus, ke tute kaŝiĝu lia primitiva penso.

Alifoj, korektoj aldoniĝas interlinie, kaj tute aliaj esprimoj anstataŭas la primitivajn. La kvina frazo de "La Gimnazio" origine tekstis: "Ne, mia principo estas, ke kviete kaj malrapide estas pli bone. Kviete kaj malrapide mi komercis, kviete kaj malrapide mi kelkajn fojojn bankrotis..." Releginte sian frazon Zamenhof konsciis, ke malrapide ne taŭgas, li strekis *mal-* kaj supertajpis *ne-*; pli bona ŝajnis al li la esprimo *butikis* kaj tial la vorto *komercis* estis forstrekita. La vorton *bankrotis* li ne ŝanĝis en sia manuskripto, kaj tamen vi trovos ĝin anstataŭigita per *haltis* en via ekzemplero de "La Gimnazio". Tiu korekto estas Zamenhofa. Sur la presprovaĵoj, la bona laboristo ne kontentigis atenteme korekti inversitajn litertipojn, aldoni mankantan interpunkcion, sed re- kaj refoje poluris sian verkon.

RIMARKOJ PRI LA 2-A PAĜO DE "LA GIMNAZIO"

Teksto tajpita de Zamenhof

6a linio: forstrekita per x-oj estas la vortoj *estas normalsaĝa*.

11a linio: la lasta vorto estis *volas*.

22a linio: tekstis *filon*.

24a kaj 25a linioj: la piednotaj ciferoj estas krajone skribitaj.

Tajperaroj estas ofte mankorektitaj, kaj interpunkcio aldonita per pluminko.

Teksto de la presprovaĵo

2a linio: Zamenhof unue tajpis *mi* kaj mankorektis al *vi*; la presisto forlasis ĉi tiun vorton, tial la margena aldonsigno sur la presprovaĵo.

4a linio: eĉ la mankantajn krampetojn en la presaĵo Zamenhof rimarkis kaj margene aldonis.

9a linio: rimarku ankaŭ la zorgajn korektojn pri krampetoj.

13a linio: Zamenhof ŝanĝis la vorton *viron* de la manuskripto al *edzon*, ŝajne post hezito, eble tial la makulo en la margeno.

20a linio: *kontraŭfari* anstataŭ la primitiva *fari*.

Marcel Delcourt

se li ellernos la sciencan hejme?" - "Mi jam diris al vi mil fojojn," ŝi diras, "ke mi neniam atingos mian konsenton, ke mi iru kontraŭ la moroj de la mondo; la moroj de la mondo postulas," ŝi diras, "ke infanoj nuntempe vizitadu gimnazion". - "Laŭ mia cerbo," mi diras, "mi opinias, ke la mondo estas freneza". - "Nur vi sola," ŝi diras, ~~estas normala prudento~~ "havas normalan prudenton," se la mondo," ŝi diras, "agus laŭ via prudento, ĝi efektive bele aspektus!" - "Ĉiu homo," mi diras, "agus laŭ sia prudento." - "Miaj malamikoj," ŝi diras, "kaj la malamikoj de miaj amikoj posedu tion en siaj poŝoj, en siaj kestoj kaj ŝrankoj, kion vi posedas en via kapo." - "Ve estas," mi diras, "al la viro, se virino ~~estas~~ ^{kuraĝas} lin kritiki." - "Ve estas," ŝi diras, "al la virino, se ŝi havas tian viron, ke virino devas lin kritiki!" Nu, iru, diskutu kun virino! Kiam vi diras al ŝi unu aferon, ŝi respondas al vi ion tute alian; kiam vi diras al ŝi unu vorton, ŝi redonas al vi dekdu; kaj se vi decidus silenti, tiam ŝi subite komencas plori aŭ tute improvizi, pardonu mian esprimon, ŝi svenas. Nu, tiam vi estas jam vere enviinda!... Unuvorte, disputo post disputo, venkis fine ŝi, ne mi; ĉar ni ne faru al ni iluziojn; se "ŝi" volas, ĉu oni povas tiam ion fari?...

Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Estis decidite "gimnazio"! Oni devas, ŝi diras, komenci preparadi la ~~fiŝan~~ knabon, ke li eniru en la "komencon de ĉiu saĝo", en la "mladŝe prigotovitelne" ¹⁾. Certe ĝi estas granda scienco! bagatelo, la "mladŝe prigotovitelne"! Mi pensas, ke ĉe ni la plej senkapabla hedera ²⁾

En la plej etaj detaloj de la laboro de Zamenhof speguliĝas lia karaktero diligenta, kaj verema. Supre: fotokopio de la tajpita manuskripto de "La Gimnazio"; sube, ĝia presprovaĵo.

Ĉu ne sufiĉas por mi se li ellernos la sciencan hejme? — « Mi jam diris al vi mil fojojn », ŝi diras, « ke neniam atingos mian konsenton, ke mi iru kontraŭ la moroj de la mondo; la moroj de la mondo postulas », ŝi diras, « ke infanoj nuntempe vizitadu gimnazion ». — « Laŭ mia cerbo », mi diras, « mi opinias, ke la mondo estas freneza ». — « Nur vi sola », ŝi diras, « havas normalan prudenton! se la mondo » ŝi diras, « agus laŭ via prudento, ĝi efektive bele aspektus! » — « Ĉiu homo, » mi diras, « agas laŭ sia prudento ». — « Miaj malamikoj, » ŝi diras, « kaj la malamikoj de miaj amikoj posedu tion en siaj poŝoj, en siaj kestoj kaj ŝrankoj, kion vi posedas en via kapo ». — « Ve estas », mi diras, « al la ~~virino~~ ¹⁾, se virino kuraĝas lin kritiki. » — « Ve estas », ŝi diras, « al la virino, se ŝi havas tian ~~viron~~ ²⁾, ke virino devas lin kritiki! » Nu, iru, diskutu kun virino! Kiam vi diras al ŝi unu aferon, ŝi respondas al vi ion tute alian; kiam vi diras al ŝi unu vorton, ŝi redonas al vi dekdu; kaj se vi decidus silenti, tiam ŝi subite komencas plori aŭ tute improvizi, pardonu mian esprimon, ŝi svenas. Nu, tiam vi estas jam vere enviinda!... Unuvorte, disputo post disputo, venkis fine ŝi, ne mi; ĉar ni ne faru al ni iluziojn; se « ŝi » volas, ĉu oni povas tiam ion fari?...

Unuvorte, kion mi rakontu al vi? Estis decidite « gimnazio »! Oni devas, ŝi diras, komenci preparadi la knabon, ke li eniru en la « komencon de ĉiu saĝo », en la « mladŝe prigotovitelne »! Certe ĝi estas granda scienco! bagatelo, la « mladŝe prigotovitelne »!

Freŝa mateno, romano de Reuven Kritz. El la hebrea tr. Ota Ginz. Eld. Libroj "PURA", Israelo, 1967. 280 p. 18 x 11 cm., ilus., bd., 6,— gld.*

Inter la lingvoj, el kiuj fontis tradukliteraturo en Esperanto, la moderna hebrea estas ĝis nun minoritata. Tial des pli gravas la nuna aldonaĵo. Ĝi estas romano, formanta la unuan parton de trilogio, kiu centriĝas en la vivo de lia infaneco — formigro el dummilita Eŭropo kaj establiĝo en kibuco de Israelo.

Pri la ĝenerala impresio: venadas en la kapon komparo al la filmotrilogio "Apu" de Satyajit Ray: kaj laŭ entuta temo kaj laŭ rakontmaniero estas similecoj. La romano, same kiel la filmoj, konsistas el epizodoj; ĝi estas ne tiom historio, kiom serio da bildoj pri diversaj situacioj, ja kronologie ordigitaj, sed ne formale kunligitaj. Tiu epizodeco modifiĝas en la daŭro de la verko: komence ĝi estas forta, poste ĝi grade ŝanĝiĝas en pli ellaboritajn historietojn, kvazaŭ spegulante la evoluantan konscion de la infano.

La tuta libro temas pri situacioj kaj spertoj de infanoj; neniam ĝi eliras el tiu kadro. Pro tio la mondaj eventoj, la milito, la stato de Israelo mem preskaŭ ne sentiĝas: la mondo estas tiu de la infanoj. Eĉ la kibuco — tiu

aparte israela institucio — vidiĝas nur implice; ĝi ne havas specialan influon sur la moroj de infana socio. Gravas ĉi tie ne politiko aŭ nacia organizo, sed individuoj en sia propra socio.

En traktado de la individuoj, ilia agado kaj interrilato, la aŭtoro sin montras lerta. Lia rakontado estas nuda konstato, sen kia ajn komento, sed ĉiam realeca. Tamen pro tiu sama nudeco, kaj pro la manko de kunligo inter la historioj, la libro ŝajnas iom supraĵeca. La diversaj epizodoj havas nek kulminon nek konkludon; interpersonaj rilatoj kaj la infana socio prezentigas vivece, sed per unu du strekoj nur, kvazaŭ preterpase — tiel ke enestas nek ĝenerala, disvolviĝanta historio, nek funda esploro pri homaj karakteroj. La aŭtoro observas akre situaciojn, sed ne restas sufiĉe longe por ilin eniri. Li tamen montras multan talenton en verkado; kaj se li ne kreis majstraĵon, li ja verkis verecan kaj interesan rakonton.

La traduko ne estas same kontentiga. El pure gramatika vidpunkto, oni trovas ĝin akceptebla: stile tamen ĝi enhavas oftajn malglataĵojn (ekz. tro da kunmetitaj verbotempoj, mallerta manipulado de vortordo). Sed la kvalito de la enhavo kompensas la iomajn malnetaĵojn de la lingvo. Eleanor Higginbottom (Usono)

Utila manlibro pri Hindujo, de M. Haudebine. Eld. Hinda Instituto de Esperanto, New Delhi, 1967. 76 p. 24,5 x 19 cm., il.* 5,— gld.

Post plurjara restado en Hindujo, kie ŝi multe pli senlace instruis kaj disvastigis la Internacian Lingvon, ol oni povus konjekti laŭ sporadaj notoj en E-gazetoj, s-ino M. Haudebine verkis vere utilan manlibron pri la vastega azia lando. En la antaŭparolo s-ino Haudebine mem diras: "Mi bone konscias, ke ĝi tute ne estas perfekta, sed la vereco de la priparolitaj faktoj estas absoluta". Tiuj ĉi vortoj estas bona prijuĝo de la libro, malgraŭ tio, ke ili povus ŝajni nur esprimo de modesteco. Ĉar, kiam temas pri Hindujo, ĉiu provo eĉ en dekoble pli ampleksa libro priparoli la tutan landon, ĉiujn ĝiajn aspektojn, interesaĵojn, problemojn, — nepre restas nur modesta provo.

Tamen, konsiderante la fakton, ke la libro de s-ino Haudebine estas la unua ĝenerala informilo pri Hindujo en la Internacia Lingvo, notinde estas, ke oni en la libro trovas tumulton da utilaj kaj interesaj faktoj, kiuj bonvenas al ĉiu vizitonto de la lando kaj al ĉiuj, kiuj volus pliriĉigi sian scion pri Hindujo. Tiuj, kiuj tro atentigas eksteran aspekton de libroj, certe trovos, ke la libro pri Hindujo enhavas sufiĉe multajn preserarojn, ke la sinsekvo de unuopaj ĉapitroj ne estas ĉiam konvena, — sed malgraŭ tio, la unua eldonaĵo de la Hinda Instituto de Esperanto certe meritas sinceran rekomendon, kaj s-ino Haudebine koran gratulon. S. Milojević (Belgrado)

Kien floroj? Modernaj popolkantoj. Tr., komp. Konisi gaku. Eld. KLEG, Osaka, 1967. 12 p. 25,5 x 18 cm., kun muziknotoj.*

Aktualajn kaj protestajn kantojn (laŭ post-noto) enhavas jena broŝuro. Kelkaj el la 12 tamen esceptas. Konataj nomoj: Seeger, Dylan, Reynolds; ankaŭ japanaj: Izumi, Isobe. Ĉiuj tradukoj bone akordas kun la melodio; tamen al kelkaj mankas poeziaj kvalitoj de la originalo (Kion vi faris al pluv'; Blovas en la vent'). Kelkaj strangaĵoj pro misa rimdevo ("nin minacu jam nul").

Unu japana (Vizaĝo neforgesebla) bone indignigas. La alia (Al amiko malproksima) estas tre bela kaj poezieca, sed falas ekster la celitan kadron. Malgraŭ kelkaj manketoj, mi bonvenigas la aperon, precipe ĉar la kuna eldono de muziko kaj, ofte tre bona, traduko plue ebligas al ni, partopreni la nuntempan vivon ankaŭ Esperante.

Wouter Pilger (Amsterdam)

(daŭrigo dekstre)

CITAJO

"The Guardian", London. Charles Humana skribis pri Honkongo en la eldono de 13 jul 67: "La lingvo de 99 % de la popolo ankoraŭ ne estas rekonita kiel oficiala. Povas aperi do tiaj situacioj, kiel en la kortumoj: eĉ kiam ĉiuj koncernatoj estas ĉinaj, oni faras al si la penon traduki ĉiun vorton en la anglan."

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO PRI LA MONDA LINGVO-PROBLEMO

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex,
Anglujo. Telefono (01) 904 9081

TRADUKOJ EN ESPERANTO

Jus aperis la dokumento de CED D/II/15, kiu listigas laŭlande ĉiujn tradukojn eldonitajn en Esperanto dum 1966: 60 titoloj el 14 landoj. Komparo kun antaŭaj dokumentoj en la serio D/II montras, ke en la dekjara periodo 1957-66 aperis entute 344 tradukoj en la Internacia Lingvo, el kiuj 207 estas libroj de minimume 50 paĝoj, kaj ke la eldonado daŭre kreskis per regulaj ŝtupoj de 12 en 1957 ĝis 60 en 1966.

En tiu dekjara periodo aperis tradukoj el 29 lingvoj kaj el 28 landoj. Inter la landoj kontribuintaj plej elstaras: Ĉinujo, Vjetnamujo, Nederlando kaj Japanujo. Inter la lingvoj: la ĉina, vjetnama, angla, japana, dana, pola kaj franca, laŭ tiu ordo. La kvar ĉefaj landoj aŭ la kvar ĉefaj lingvoj kontribuas kune ĉirkaŭ 50% el ĉiuj tradukoj.

Pli ol unu triono de la tradukoj (137) estis belliteraturaj. La aliaj plej gravaj klasoj estas juro, politiko kaj ekonomio (92 tradukoj) kaj historio, geografio kaj biografio (45). Natursciencoj kaj tekniko, aliflanke, prezentas nur 3% de la tuto.

Analizo de la ciferoj montras ankoraŭ aliajn interesajn faktojn. Inter la landoj de eldono, Ĉinujo tenas la unuan lokon jam de 1961, plejparte per politikaj eldonaĵoj. Koncerne belliteraturajn tradukojn elstaras Hispanujo (Stafeto). La ĉina kaj la angla estis la lingvoj plej favorataj de la Esperanto-tradukistoj sur la kampo de belliteraturo.

Por komparo, jen kelkaj statistikoj de Unesko pri la monda eldonado de tradukoj en naciaj lingvoj. En 1964 aperis en la tuta mondo, laŭ "Index Translationum", 34 000 tradukoj el 69 landoj (Esperanto en 1964: 53 el 14 landoj). La kvar ĉefaj fonto-lingvoj estis, laŭvice, la angla, rusa, franca kaj germana, kiuj kune donis pli ol 70% el ĉiuj tradukoj (Kvar ĉefaj por Esperanto: 50%). La proporcioj de religiaj, politikaj kaj belliteraturaj tradukoj estas similaj al tiuj por Esperanto, sed la proporcio de sciencaj kaj teknikaj tradukoj estas nete pli alta: 13% (Esperanto: 3%).

Procezo, aŭtobiografia novelo de Tada tacuo. El la japana tr. Aojama tooru. Eld. la aŭtoro, Tokio, 1967. 38 p. 18 x 12 cm., bd.,* 3,60 gld.

En la antaŭparolo de ĉi tiu libro, ties aŭtoro skribas: "... depost la naskiĝo mi ricevis militarisman edukon. Eĉ en plej malbona stato de milito, (temas pri la lasta tutmonda milito) mi kredis venkon de Japanujo, ĉar Kamizake, dia vento subtenas nin. Eble vi ne povas imagi kia granda sufero atakis min, kiam Japanujo estis venkita..." "... Ĉi tiu verko estas mia juneco mem vundita de la milito."

La densa, ne facile penetrebla fantazio simbólica de PROCEZO, kiu apogiĝas sur kelkaj apenaŭ skizitaj okazaĵoj, donas al la libro kuriozan karakteron, kaj al la leginto la impreson de io senforma, nebulmola kaj forvaporiganta, kiel fuĝaj bildoj de sonĝo.

Ie kaj tie lingvaj strangaĵoj faras ankoraŭ pli konfuza ĉi tiun sensubstancan rakonton, kies apero, en sobre eleganta tipografio sur bela papero, ŝajne ne multe pliriĉigos la Esperantan traduk-literaturon.

F. de Diego (Hispanujo)

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

La lasta, rakonto de W. Reymont. El la pola: K. Bein (Kabe). Fotorepreso PEA, Varsovio, 1965. 15 p. 20 x 14,5 cm. 0,80 gld.*

Kontraŭ la usona agreso — por la nacia savo, de Ho chi minh. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1967. 148 p. 19 x 13 cm., frontispico.* 1,— gld.

La Lao-revolucio dudekjara. Eldonejo Neo Lao Haksat (Hanojo), 1967. 35 p. + 12 foto-paĝoj, mapo.* 0,75 gld.

Brilo de fantomo, originala novelo de Margid Thoræus-Ekström. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Åbyhøj, 71 p. 21 x 15 cm.* 4,50 gld.

Japanaj popolkantoj, tr. Kikunobu Matuba. Kantas Masako Hirakawa. Eld. Amo-Akademio, Japanujo, (1967). Disko fleksebla, 17 cm. diam., unuflanka, 33 r/m.* 2,25 gld. (kun tekstoj kaj muziknotoj).

Moi, j'ai choisi... (Mi elektis...). Eld. Editions Françaises d'Espéranto, Rue P. Vergnes, Marmande, Francujo. 1967. Pri-Esperanta faldfolio.

Hungario 1945-1965. Eld. Junulara Presajeldona Entrepreno, Budapest, 1966. 63 p. 14 x 10 cm., ilustr.

Rakontoj pri Liu Hulan. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 40 p. 20,5 x 18 cm., kolorilus. Por infanoj. 0,90 gld.*

Mallonge pri Ĉeĥoslovakio, de Boleslav Seidl. Eld. Orbis, Prago, 1966. 63 p. 17 x 12 cm., ilustr.

Zamenhof, biografia romano de Kanzi Ito. Eld. Nagasue Shoten, 11 Takamatu-cho, Fukuinagami, Higashiyama-ku, Kyoto-shi, Japanujo. 1967. 620 p. 21 x 15 cm, ilustr., bind. Japanlingva.

Jen nia mondo. Kantas Duo Espera. Eld. Iramac, Nederlando, 1967. Disko stereofona/monofona, 33 r/m, diam. 30 cm., kun tekstoj. 16,50 gld.*

Preparoj al Diservo, de Hans Amund Rosbach. Eld. la aŭtoro, (Norvegujo, 1967). 88 p. 21 x 15 cm., fotopresita. 6,— gld.*

Afrikanaj infanoj kaj Originala Afrika Arto, serioj de po 4 foto-poŝtkartoj kun Esperanta teksto. Eld. Agado E3, Van Hulststraat 1, Ter Apel, Nederlando (1967). Prezo: 2,50 gld. por 2 serioj.*

CED

esperanto
decembro 1967

LAŬFAKE

Blinduloj

● La internacia Esperanto-seminario de blinduloj (87 el 15 landoj) en aŭgusto apud Kolonjo direktis rezolucion pri specifaj blindulaj problemoj al la Eŭropa Regiona Komitato de Tutmonda Konsilantaro por Bono de la Blinduloj.

Fervojo

● En la Internacia Kongreso de la Eŭropa Interamikiĝo de Staciistoj (Brugge, Belg., 23-24 sep 1967) ne povis okazi ĉi-jare la oficiale enprogramigita Esperanto-kunveno. Tia kunveno tamen restos en la programo, eksperimente, por la venonta kongreso en Italujo, apud lago Garda.

Geografio

● La Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj, starigita dum kunveno en la 43-a Universala Kongreso en Mainz, 1958, finis la unuan parton de sia laboro kaj preparas grandan mondomapon kun ĉiuj interkonsentitaj nomoj.

Korespondado

● Kultura dusemajna gazeto "Neděle" publikigas korespondanconojn en Esperanto senpage. Skribu al: O. Kníchal, Esperanto, Vinohradská 2, Praha, Ĉeĥoslovakujo.


Literaturo

● Ĉi-jare aperis anglalingva traduko ("Logic") de la 200-paĝa traktaĵo de Martinus "Logiko", originale verkita en la dana. La tradukon peris Esperanto kiel ponto-lingvo.

● La premion Comella-Bassols (por la plej bona gaja rakonto en Esperanto) gajnis ĉi-jare prof-ino Clelia Conterno (Italujo), per sia verko "Avinjo".

Religio

● Al la "Unua Komuna Kongreso de IKUE/KELI" (Limburg, Germanujo, 25 jul - 1 aŭg 1968) jam aliĝis 42 personoj el 12 landoj ĝis la fino de septembro. La programo antaŭvidas i.a. prelegojn, diskutojn, ekumenajn diservojn kaj am-bankedon (?!). Poste iros karavano de Limburg al Madrid por la 53-a UK. Adreso: Esperanto-Kongreso, Marktstr. 27, D-625 Limburg.



esperanto
decembro 1967

Turismo

● Aperis novaj turismaj prospektoj en Esperanto pri Glasgow (Britujo), Bela Palanka kaj Primošten (Jugoslavio), Ĉeĥoslovakujo (eld. Orbis, Praha). Oni petu ilin ĉe la koncernaj Turismaj Oficejoj.

Unesko

La konata revuo "Kuriero de Unesko", kiu ĝis nun aperadis en 9 eldonoj en 8 lingvoj, de post julio 1967 aperas ankaŭ en la hindia kaj tamila lingvoj, respektive en Delhio kaj Madraso.

LAŬLANDE

Afriko

● La "Agado E3" organizata de IKUE por helpi afrikajn blindulojn ĝis nun sukcesis kolekti 7000,— gld. por la starigo de "Kliniko D-ro L. L. Zamenhof" en Afriko — sed tia kliniko kostos entute 25 000,— gld! Kontribuojn oni povas ĝiri al n-ro 1020100 de s-ro J. A. Tuinder en Ter Apel, Nederlando.

Ĉeĥoslovakujo

● La ĉi-jara (17-a) somera tendaro allogis 260 gekursanojn el 11 nacioj. La programo konsistis el diversnivelaĵoj, i.a. pri pedagogio, literaturo kaj historio, ekskursoj, sporto ktp.

● La riĉprograman Esperantistan Kulturan Festivalon en Opava en julio ĉeestis 330 personoj, inter kiuj 36 eksterlandanoj. La ĉefajn aranĝojn ĉeestis la urbestro de Opava kaj delegito de la ministerio de kulturo.

Danujo

● La Aŭtunajn FERIAJN Kursojn en Aarhus partoprenis 60 personoj el 9 landoj. La programo inkluzivis, krom kursoj diversnivelaĵoj kaj ekskursoj, prezentaĵojn de kantistino Ramona van Dalsem.

Germanujo

● Okaze de la eldono de nova lernolibro ĝia aŭtoro gvidos en orienta Berlino seminarion por kursgvidantoj. La veturkostojn pagas la Germana Kultur-Ligo.

● Unuafoje la orientgermana poŝto uzis Esperanto-stampon — okaze de filatela ekspozicio en Karl-Marx-Stadt, 7-15 okt 67, kies Esperantan sekcion vizitis 25 000 personoj. Adreso por interesiĝantoj: Germana Kulturligo, DDR-9033 Karl-Marx-Stadt, Postfach 7.

Nederlando

● La 21-an de decembro festas sian 75-jariĝon s-ro Teo Jung, honora membro de UEA kaj akademiano.

● En la grava gazeto "Het Vrije Volk" aperas de post 21 sep 67 ĉiusemajnaj Esperanto-lecionoj.

Usono

● En vespera kurso de Allan C. Boschen en Pittsfield, Mass., lernas i.a. dek instruistoj profesiaj, kiuj baldaŭ ekinstruos Esperanton en siaj lernejoj. (Foto)

53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrid, 3-10 aŭgusto 1968

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Statestro de Hispanujo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

No. 3 Rotterdam, la 30-an de okt. 1967

Aliĝkotizoj ekde 1 jan 68:

Kongresano	77.— gld.
Edz(in)o	33.50 gld.
Junulo ĝis 20-jara	23.— gld.
Univ. Studento	38.50 gld.
Blindulo	31.— gld.

Individua Membro de U.E.A., kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon "Esperanto", rajtas rabaton de 20.— gld. Tiu ĉi rabato validas nur por la kategorio "Kongresano".

Enirvizoj

La oficialaj instancoj en Hispanujo garantiis al LKK, ke enirvizoj estos donitaj sen distingo pri la landoj, el kiuj venas la kongresanoj.

Fervoja rabato

Kun la Dua Bulteno ĉiu aliĝinto ricevos specialan rabatilon, per kiu, prezentante ĝin je aĉeto de revenbileto fervoja al Madrid, oni ĝuos rabaton ĉe la hispana fervojo kaj ĉe preskaŭ ĉiuj trajnotaj landoj. Detalaj klarigoj akompanos la rabatilon.

Dua Bulteno

En januaro 1968 ĉiu aliĝinto ricevos la Duan Oficialan Bultenon, kiu enhavos ĉiujn necesajn informojn koncerne loĝadon, ekskursojn, k.t.p.

Arta Festivalo

Artistaj grupoj aŭ individuoj, kiuj deziras partopreni en la programo de la 4-a Internacia Arta Festivalo, povas sin anonci ĉe la konstanta adreso ĝis la 15-a de januaro 1968. Por ke L.K.K. povu decidi pri la sinproponoj, nece-

sas ke ili estu akompanataj de rekomendoj de kompetentaj personoj aŭ instancoj kaj de konkretaj pruvoj pri la nivelo de la sinproponintoj.

Foto-Konkurso "Homaj Rajtoj".

En la kadro de la 4a Internacia Arta Festivalo kaj okaze de la Jaro de Homaj Rajtoj 1968 LKK aranĝas internacian Foto-Konkurson kun minimume tri premioj de 100, 70 kaj 40 gld. respektive. La partopreno estas nelimigita: ĉiu rajtas konkursi per laŭvola nombro da nigra-blankaj fotoj en minimuma formato 13 x 18 cm. Kiel temon oni rajtas elekti kiun ajn citaĵon el la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (unuopaj ekz. senpage riceveblaj de la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2).

Jen kelkaj ekzemploj el multaj elekteblaj citaĵoj: "La familio estas la natura kaj fundamenta grupunu de la socio" (Art. 16.3); "Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo" (Art. 19); "Ĉiu havas rajton de laboro" (Art. 23.1); "Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo" (Art. 24).

Konkursajoj devas atingi antaŭ la 1-a de julio 1968 jenan adreson: 53-a Universala Kongreso de Esperanto, Poŝtkesto Nr. 19039, Madrid, Hispanujo. LKK resendos la nepremiitajn fotojn, nur se la konkursanto pagas la sendokostojn. Premiitaj fotoj apartenos al UEA kaj laŭeble aperos en "Esperanto". Dum la UK okazos ekspozicio de la premiitaj kaj aliaj elektitaj konkursajoj.

Statistiko (ĝis 10 nov 67)

Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstrujo 1, Bel. 10, Bra. 2, Bri. 22, Bul. 13, Ĉeĥ. 1, Dan. 9, Fin. 5, Fr. 31, Ger. 10, Gre. 1, His. 41, Hun. 7, Isr. 1, Ita. 10, Jap. 3, Jug. 14, Kan. 3, Mek. 1, Monako 1, Ned. 18, Nor. 3, NZ 1, Pol. 8, Portug. 2, Sov. 1, Sve. 13, Svi. 3, Uso. 10; entute 247 el 31 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Largentier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la oktobran eldonon.

RADIO ROMA. Vidu detalan programon en la novembra numero.

RADIO WIEN prezentos sian esperantlingvan programon de 14.30 ĝis 14.45 la 1-an, 15-an kaj 29-an de decembro per ondo 203 m (1475 kcs).

RADIO BILBAO elsendas nun de 23.05 ĝis 23.30 merkrede per ondo 212 m (1412 kcs).

SVISA RADIO de 5-XI ĝis 4-V disaŭdigas la Esperanto-rubrikon per la jenaj ondoj: lunde kaj merkrede je 12.05, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 19.60 m (15305 kcs), 13.94 m (21520 kcs); ĵaŭde kaj sabate je 21.50, 75.28 m (3985 kcs), 48.66 m (6165 kcs), 31.46 m (9535 kcs), 31.27 m (9595 kcs), 25.25 m (11880 kcs). Lunde kaj ĵaŭde parolas d-ro Arthur Baur, merkrede kaj sabate s-ro Claude Gacond. La ondlongoj 31.27 m, 25.25 m, 19.60 m, kaj 13.94 m estas speciale direktataj al Afriko.


POLA RADIO en Varsovio ĝis aprilo 1968

uzos la jenajn ondlongojn: 50.25 m (5970 kcs), 42.11 m (7125 kcs), 41.99 m (7145 kcs), 31.50 m (9525 kcs), 25.59 m (11725 kcs), 25.42 m (11800 kcs), 25.09 m (11955 kcs); ĉiutage je 15.30. Se aŭskultantoj de ĉi tiu programo havas amikojn ie ajn en Eŭropo, ili povas ĝojigi ilin sendante al ili salutojn, esprimon de memoro kaj simpatio pere de la "Koncerto kun bondeziroj". Por profiti ĉi tiun senpagan servon oni devas nur skribi la antaŭnomon, nomon kaj precizan adreson de la persono aŭ personoj, kiun aŭ kiujn oni deziras saluti. Krome, la Pola Radio aranĝas por la eksterlandaj aŭskultantoj diversajn konkursojn kun pluraj valoraj premioj, kiel ekzemple senpagaj vojaĝoj kaj restadoj en Pollando. Por profiti la priskribitajn aranĝojn skribu al Pola Radio, Esperanto-disaŭdigoj, Varsovio, Pollando.

ARGENTINA RADIO per la stacio Radio Nacional en Rosario disaŭdigas ĉiusemajnan programon prezentatan de Argentina Esperantista Junulara Organizo: vendrede de 21.15 ĝis 21.30 per ondo 229 m (1310 kcs).



esperanto
decembro 1967



LA JUNA VIVO

**Oficiala organo de
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando**

JUVENTUR,

la pola junulara vojaĝoficejo, PEJ, kaj la Turisma Servo de TEJO organizis la 1-an Internacian Turisman Kunvenon de Esp. Junularo en Bydgoszcz, en aŭgusto. Partoprenis 50 gejunuloj el 6 landoj. Ankaŭ okazis Seminario de TEJO pri "Esperanto en Turismo" kaj prilaboro de Zamenhof-trako.

Interese prelegis István Nemere kaj Ivo Osibov, kaj la aranĝo estis ĝenerale sukcesa el vidpunktoj de programo kaj informado. Pli detalajn raportojn vi trovu en la studenta semajnavuo "ITD" n-ro 39 (357), havebla ĉe la adreso: ITD, str. Ordynacka 9, Warszawa, kaj en la 5-a numero de "Tamen", la gazeto de PEJ. (Adreso: pk. 198, Kraków.)

Polaj instancoj, gazetaro kaj radio bone akceptis la aranĝon. Post ĝi, la prezidanto de TEJO, Ivo Osibov, estis gasto de la direktoro de Juventur, en la Grand Hotel de Varsovio. En amika atmosfero oni priparolis problemojn de internacia junulara turismo. Juventur (Al. Roz 2, Warszawa) pretas ĉiam akcepti grupojn de minimume 10 junaj esperantistoj (ĝis 30 j.) en Polujon kaj prizorgi por ili tute peresperantan programon laŭdezire.

(rap. Tur. Servo de TEJO)

GEJ ATAKAS NEJOjn.

Germana Esperanto-Junularo per cirkulero al la Landaj Sekcioj anoncis informkampanjon inter Ne-Esperantistaj Junularaj Organizaĵoj (NEJOj). La celo estas, ke NEJOj, surbaze de per enketo konstatitaj bezonoj, starigu Esp.-rondetojn interne de siaj kluboj. Helpe al tio, GEJ pruntos laŭpete al NEJOj kolor-diapozitiv-serion kun akompana sonbendo.

La serio estas preskaŭ preta. Ĝi baziĝas sur materialo de s-roj Lentaigne, Eckart kaj Pickel. Tamen, pliaj diapozitivaj pri diversrasaj personoj interparolantaj, pri Esp.-diservoj, pri infankongresoj, pri UEA-Komitatkunsidoj, kaj pri junularaj Esp.-renkontiĝoj, estas ankoraŭ serĉataj. Ĉiu, kiu bonvolas mallonge prunti al GEJ siajn dia-ojn por kopio, certe plezurigos per tio la prizorganton: s-ro H. Behrmann, Volksschule Süd, 4972 Löhne-Obernbeck, Germ.

PROGRAMO PASPORTO

Ĵam plurfoje aperis sur tiuj ĉi paĝoj. Vi do certe memoras, ke temas pri interŝanĝa loĝigo de junaj ĉe junaj esperantistoj. La prizorganto, Rubén Feldman González, Bv. Oroño 866 A, Rosario, Argentino, ĵam kolektas la unuajn reagojn al sia alvoko. Jen denove: Varbu en via areo almenaŭ unu gastiganton por la Programo Pasporto. Tio kostas al vi nek

laboron, nek monon, nur iom da eltrovemo kaj konvinkemo.

Eventuale petu pliajn informojn de la prizorganto.

LA NEJO-KOMISIONO DE TEJO

ne ĵam sukcesis trovi administran helpant(in)on. Jen denove la detaloj: li/ŝi laboru en Amsterdam dum duonaj tagoj por la komisiono (korespondado, dokumentado), kaj kontentiĝu per ĉefamilia gastigado, repago de vojaĝkostoj inter hejmo kaj Amsterdam, kaj 1000,- gld. jare por poŝmono. Li/ŝi regu la francan aŭ anglan lingvon, prefere denaske, kaj krome pretu entuziasme kunlabori en ĉi tiu nova, sukcesa branĉo de agado. Informpetojn sendu al la redaktoro LJV.

FASKO DA nordfrancaj informoj:

En Wattrelos okazis ekspozicio en nova junulardomo pri Turismo kaj kulturo en Eŭropo. Esperanto reprezentigis.

Lernejaninoj el kurso en Valenciennes partoprenis deklaman konkurson en Esperanto. Ses el ili gajnis premiojn.

Je la iniciato de la lokaj Esp.-grupoj, gejunuloj povas partopreni kulturajn interŝanĝojn inter la urboj Arras (Fr) kaj Leeuwarden (Ned).

Junaj esperantistoj estas bonvenaj ĉe la nova tranoktejo en Arras (vd. jarlibron p. 223).

Ĉu vi ŝatus partopreni konkurson pri amuzaj anekdotoj en Esperanto? Se jes, sendu mallongan tekston al la adreso 3 Allée Béranger, 59-Croix, Fr. Libropremio rekompencis la unuan gajninton (C. Martins), kiu rakontis amuzan travivaĵon en Turkujo.

(rap. L. Giloteaux)

RALIO ORGANIZITA DE PEJ

La Rondo de Pola Esp. Junularo en Katowice aranĝis en oktobro la 2-an Tutpollandan Ralion de esp-istoj. Partoprenis 14 teamoj el 8 urboj, entute 63 personoj. Ili veturis laŭ kvar diversaj vojoj al la celo sur la monto Szyndzielnia. Partoprenantoj ricevis tie premiojn kaj memoraĵojn kaj poste kunsidis en gastejo. Dum la kunsido oni elektis Vojevodian estraron de PEJ en Katowice, kaj priparolis problemojn de sileziaj rondoj de PEJ.

(rap. Jan Miluch)

LA PREZIDANTO HAVAS NOVAN ADRESON

La prezidanto de TEJO, Ivo Osibov, transloĝiĝis al: Braĉe Santini 33, SPLIT, Jugoslavio.

TEJO EN SEMINARIO DE UNESKO-ORGANIZAJO

La Kunordiga Komitato por Internacia Volontula Servo (CCIVS) de Unesko organizis seminarion por organizantoj de volontulaj tendaroj. La seminarion, kiu okazis en Marly-le-Roi apud Parizo, partoprenis f-ino J. M. Liouville, nome de la NEJO-komisiono de TEJO. La partopreno rezultigis al TEJO multajn novajn, utilajn kontaktojn kaj plian reputacion inter Ne-Esperantistaj Junularaj Organizaĵoj (NEJOj).

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1967

stato je la 31-a de okt. 1967

Konkurso I

Lando		Kvoto	Poentoj	%
1	Hispanujo	3250	2940	90,46
2	Japanujo	3965	3560	89,79
3	Italujo	4220	3770	89,34
4 (5)	Francujo	7752	6849	88,35
5 (4)	Svedujo	7180	6185	86,14
6	Nederlando	5975	5116	85,62
7	Belgujo	2055	1750	85,16
8	Danlando	3099	2601	83,93
9	Germanujo	7221	5950	82,40
10	Britujo	6691	5499	82,19
11	Usono	4526	3650	80,65
12	Finnlando	3160	2300	72,78
13	Svislando	2459	1705	69,34
14	Jugoslavio	5375	3350	62,33
15	Brazilo	3856	2354	61,05

Konkurso II

1	Kanado	1124	1251	111,30
2	Islando	250	260	104,—
3 (7)	Israelo	595	565	94,96
4 (3)	Aŭstrujo	1475	1245	84,41
5 (4)	Aŭstralio	1475	1219	82,64
6 (5)	Sudafriko	260	200	76,92
7 (6)	Nov-Zelando	1481	1103	74,48
8	Grekujo	270	165	61,11
9	Norvegujo	1755	1065	60,69
10	Argentino	905	540	59,67
11	Madagaskaro	250	143	57,20

(Vidu la regulojn sur paĝo 33. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

NOVAJ DELEGITOJ

Aperos en la Jarlibro 1968/I, nun preparata.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1967)

Argentino. Córdoba.

Aŭstralio. Ballarat: JD.

Aŭstrujo. Wels.

Belgujo. Bruxelles-Brussel: FD (Komerco).

Brazilo. Baturité: FD (Komerco). Campinas.

Ijuí. Recife: FD (Edukado) & (Religio: kat.).

Rio de Janeiro: FD (Industrio) & (Religioj). Rio

Grande. São José dos Campos: D. Tupaciguara.

Ubá. Uberaba. Uberlândia. Volta Redonda: FD (Elektrotekniko).

Britujo. Liverpool. London: VD (N.W. 5).

Oxford: FD (Bibliotekoj).

Bulgarujo. Pordim. Jambol: D & FD (Jurnalismo).

Kazanlik: D. Loveč: JD. Pazarĝik: FD

(Studentaj aferoj). Razgrad: FD (Sindikataj

aferoj). Sliven: D. Sofia: FD (Juro), (Jurnalismo),

(Komerco) & (Sindikatoj). Stanke Dimitrov.

Stara Zagora.

Ĉeĥoslovakujo. Ústí nad Labem: FD (Kulturo).

Danlando. Faaborg. Haslev: FD. Hvidbjerg.

Skodborg J.

Finnlando. Hämeenlinna: FD. Helsinki: VD

(Helsinki 53). Jyväskylä. Riihimäki: FD. Seinä-

joki: VD, FD (Astronomio). Turku: FD (P.T.T.).

Vilppula.

Francujo. Grenoble: FD (Fiziko). Nice: VD.

Riom. Tourcoing: VD.

Germanujo: Augsburg: FD. Essen. Limburg. Werdau.

Greklando. Athinai: FD (Filologio), (Vegetarismo). Thessaloniki: D, JD.

Gvatemalo. Guatemala.

Hispanujo. Las Palmas: D.

Italujo. Bologna: FD (Skoltismo). Messina. Mi-

randola. Napoli: VD. Parma: FD. Reggio Emilia.

Roma: FD (Blinduloj), (Lingvoj). Torino: FD

(Fotografio). Verona: FD (Domkonstruado),

(Religio). Vicenza: D, FD (PTT).

Japanujo. Nagasaki. Osaka: VD, FD (Telegr.).

Jugoslavio. Beograd: FD (Aplikita arto), (Ekon.

politika), (Elektromekaniko), (Komerco). Celje.

Ljubljana: FD (Konstruado). Novi Travnik.

Požarevac. Zagreb: VD, FD (Astr.).

Maroko. Casablanca.

Nederlando. Eindhoven: FD (Turismo). Marken.

Norvegujo. Kristiansand S. Kristiansund N.: D.

Nov-Zelando. Lower Hutt: FD (Edukado).

Pollando. Bydgoszcz: FD (Muziko). Bytom. Gli-

wice: FD. Jarosław. Katowice: JD, FD (Sis-

mologio). Koszalin. Kraków: FD (Ark.). Poznań:

FD (Folkloro). Starachowice. Tczew. Warszawa:

FD (Sindikatoj).

Soveta Unio. Riidaja.

Svedujo. Stockholm: FD (Turismo).

Svislando. Biel-Bienne: FD (Edukado). Herisau.

Langenthal: FD (Purigado de teksaĵoj).

Usono. Bowman. Downey. Pacoima. Portland:

VD. San Diego: FD (Librotenado).

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Glättli, s-ro Ernst, CH-5200 Brugg, Svisujo.

DONACOJ POR GENERALA KASO (Gld).

Nederlando: Moerbeek, s-ro R., 60,—.

FONDAJO CANUTO

Germanujo: Schmidt, s-ro G., 1 J-MA.

(turnu)

NEKROLOGOJ

CHARLES E. PETERSON

La 9-an de oktobro 1967 mortis en Århus, Danlando, dum libertempo s-ro Charles E. Peterson el Downey, Kalifornio, prezidanto de la Esperanto-klubo de Los Angeles. Li estis delegito de UEA de post 1955, komitatano de 1959 ĝis 1967, dumviva membro de 1966. Li estis 68-jara. Krom per aktiva laboro li subtenis la movadon ankaŭ finance. Ĉe la enterigo parolis s-ro L. Friis Esperante.

JERZY LOTH

Prof. d-ro Jerzy Loth, eminenta ekonomiisto-geografo kaj sportisto, forpasis en Varsovio komence de oktobro 1967. Li estis dum pli ol 20 jaroj profesoro de la Varsovia Universitato, membro de la Internacia Olimpika Komitato, sekretario de la Pola Scienca Asocio, kunfondinto de la Pola Geografia Societo, distingita i.a. per ordenoj polaj kaj finna. Li lernis Esperanton en 1905 kaj fariĝis prezidanto de Pola Esperanto-Asocio en 1961.

oficiala informilo
n-ro 407, 1 nov. '67

esperanto
decembro 1967

Ĉiu kontribuu por helpi la esperantistojn en landoj kun malforta valuto omaĝe al la prezidinto de UEA, prof. d-ro Giorgio Canuto. En tiu ĉi jaro la Fondaĵo estas uzata ĉefe por pagi kotizojn de sindonaj novaj esperantistoj en Azio kaj Afriko.

DONACOJ POR LA 52-a UNIV. KONGRESO
Francujo: Muller, s-ino M., 30,— gld.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.
M. H. Vermaas,
Direktorino, C.O.

ANONCETOJ

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Dietr Kremp, D-75 Karlsruhe 41, Kastellstr. 17, Germanujo.

Ni aranĝas letervesperon dum Marto 1968. Ni respondos al ĉiuj. Adreso. S-ro Gaudeau, 13 rue des Amandiers, F-91-Savigny-sur-Orge, Francujo.

La Harlema Esp.-grupo "Komprenado faras pacon" organizas letervesp. en febr. '68. Sendu b.k. kaj let. ĝis 20 febr. al: Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout, Ned. Resp. gar.

Danuta Kubiak petas siajn korespondamikojn skribi je la nova adreso: Tirillunga 8, Gjetum p.å., Norvegujo.

Se vi interesiĝas pri petrografio, skribu al: s-ro Harry Borchert, Kneeseckerweg 15, D-3395 Bad Grund/Harz, Germanujo.

Studento komencas anglan-Esperantan brodkaston per kolegia radio por informi kaj varbi neesperantistojn. Gesamideanoj bonvolu sendi mallongajn kartojn, kiujn mi legos aŭ mencios radie. S-ro Scott Aleshire, Oldenborg Center, Pomona College, Claremont, CA., 91711, Usono.

Tie ĉi publike mi esprimas mian sinceran dankon al fraŭlino Hofmann kaj al sinjoroj Höfert, Pickel, Rausch, Spirat, Driesen, Iserentant, Bernier, kiuj faris al mi grandan servon dum mia eksterlanda vojaĝo. Ladislao Somlai, Budapeŝto.

La internacia lernejo de Bjørn. Lerneja klaso — ĉiuj gelernantoj ĉ. 12-13-jaraj — deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn kun infanoj de ĉiuj landoj. Ĉiuj respondoj estos responditaj. S-ino Karen Bjørnsby, "Bjørns Internationale Skole", Hartmannsvej 23, København, DK-2900 Hellerup, Danlando.

23-jara agrikulturisto-teknikisto deziras korespondi kun gejunuloj de okcidenta Eŭropo, Ameriko (suda kaj norda), Azio kaj Aŭstralio. Intereso: agrikulturo, geografio, naturo, sporto, filmo, muziko. Interŝanĝo pk, fotojn (ne poŝtmarkojn). Stanislav Karés, Polst cp. 47, p. Miletin, okres Jicin, Ĉeĥoslovakujo.

Korespond-alvoko: Mezaĝa svedo deziras korespondi kun geesperantistoj 15-70-jaraj! Leteroj pri ĉiuj temoj, interŝanĝo de fotoj, ktp. Åke Holmkvist, Ångermannagatan 187, 2 tr., Stockholm — Vällingby, Svedujo.

La Mondcivitana Legitimkarto en Esperanto. La Internacia Registro de l'Mondcivitanoj, kiu

de du jaroj konigis la malfermon de naciaj centroj, ankaŭ elektis novan respondeculon por la speciala centro "Esperanto". Ek de nun la esperantistoj sin turnu por peti la enregistriĝon kiel mondcivitano al s-ino Renée Volpelière, 19 Rue Servie, F-30-Nîmes (Francujo). Alia novigaĵo: La IRMC decidis alligi la esperantan tradukreton: "MORETO" al tiu speciala centro Esperanto. Pro la nuna disvolviĝo de la mondcivitana ideo tra la mondo Moreto estas prenonta novan antaŭeniron. Fakte oni scias, ke la esperantistaj tradukantoj de la reto efektivigas per duobla traduko la plej malfacilajn ligadojn inter ne esperantistaj mondcivitanoj de malsamaj naciaj lingvoj.

Aĉetu la plej belan, luksan kaj malmultekostan vortaron ĵus aperintan. Esperanto-Hispana kaj Hispana-Esperanta; 384 paĝoj, 25 000 vortoj, kaj 45 000 signifoj, kun detala gramatiko. Nepre taŭga por partoprenantoj en la Universala Kongreso de Madrido aŭ la TEJO-Kongreso en Tarragona. Ankaŭ bela eldonaĵo por via Esperanto-biblioteko. Utila por lernantoj de hispana lingvo. Sendu ses (6) respondkuponojn al Hispana Esperanto-Instituto, Apartado 2428, Barcelona, kaj vi ricevos ĝin per rekomendita poŝto.

Mi bezonas la du lastajn jarojn de La Revuo (1913-1914). Bv. fari ofertojn al s-ro Ramon Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Deziras interŝanĝi P. M. kun ĉiuj landoj, Miguel González, Apartado no. 5, Astillero, Santander, Hispanujo.

Religia kaj katolika literaturo estas mendebla ĉe la eldonejo EKUMENA ESPERANTO, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando. Petu libroliston.

Kial Ne? La inteligenta Esperanto-gazeto por modernaj gejunuloj. Leginda — pensiga — satirema. Unuvorte — la sola gazeto por raciaj homoj. Jarkotizo: 20 steloj/10 ŝilingoj. 'Kial Ne?', 2 Edwina Gardens, Redbridge, Ilford, Essex, Anglujo.

Ĉu vi estas preta korespondi en Esperanto kiel "onkl(in)o" kun alilanda infano? Skribu al: s-ro J. H. Sullivan, 3 Berwick Avenue, Urmston (Manchester), Britujo.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue des Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Adressanĝo: S-ro M. Rétot, eldonanto de Universala Revuo kaj Esperanto-Parolata, nun loĝas: 11 Boulevard Davout, Paris-20.

Ĉu vi estas ĝuste informita pri la katolika eklezio kaj ĝia tutmonda agado? Abonu la organon de I.K.U.E., ESPERO KATOLIKA. Jarkotizo svisaj fr. 13.— Mendebla ĉe: Centra Oficejo de IKUE, CH-9106 Zürchersmühle, Svislando.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Graĵnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Graĵnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

ESPERANTISTA KULTURDOMO

Serena Ripozejo - Turisma Nodvojo

ĉe sola adreso:

Kastelo "GRESILLON" -49- BAUGÉ - Francujo

El la 1968-a programo, elektu ĝindajn feriojn:

4-4—11-4: Sesa Kultura Semajno organizita de U.F.E. kaj G.E.E.

30-6—21-7: Esperantaj Studoj, Ekzamenoj, Ekskursoj.

21-7— 3-8: INTERNACIAJ TURISMAJ kaj KULTURAJ FERIOJ.
kun granda RALIO organizita de E.K.D.

Prelegoj de valoraj esperantistoj, konversacioj, distraj vesperoj, ekskursoj.

4-8—25-8: Kulturaj Esperantistaj Semajnoj: Diversgradaj ekzamenoj, kursoj, paroladetoj, filmoj, bindado, korbofarado, kantoj, ekskursoj.

25-8— 8-9: Studperiodo organizita de U.F.E. Kultura programo, kursoj, promenadoj.

8-9—15-9: (nur se nombro de aliĝintoj estos sufiĉe granda)
Ripoziga, distra periodo.

De Pasko ĝis la fino de Julio estas eble akcepti grupojn, eĉ ne-esperantistajn, por pli-malpli longaj periodoj.

Petu detalajn informojn — Aliĝu frue.

VICTOR SADLER

MEMKRITIKO

Originala poemaro kun komentario

60 p. — 17,6 x 12,5 cm. — flaveca, fortika papero — rigida, silkolina bindo kun ora surpriso — plus papera protekta kovrilo — 6,50 gld. (26 steloj).

Eldono de KOKO Mendu per UEA

Aperos en la komenco de decembro 1967

Estas disponeblaj ĉe UEA nur 18 ekzempleroj de

"VERDAJ DONKIĤOTOJ"

kun propramane subskribo de

JULIO BAGHY

Enhavo: 170-paĝa romano "Paŭlo Paal" kaj 45 p. da "Karikaturoj". Pro la malnoveco la papero estas kelkloke difektita, sed la teksto ne. Ĉiu ekzemplero havas tute novan tolan bindaĵon. Por tiuj eksterordinaraj bibliofilaj trezoroj estas fiksita prezo de po 15,— gld. (60 st.).

Ricevos ilin la unuaj mendantoj al la C.O.!

Jam en sia dua jaro!

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi ilian gravegan agadon per via abono! Aperas kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld. (7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

Nepre partoprenu en la

FOTO-KONKURSO

pri la

HOMAJ RAJTOJ!

Legu la detalajn informojn

sur paĝo 177!

Ne forgesu

LA TAGON DE LA HOMAJ RAJTOJ:

10 DECEMBRO

Distribuu la Esperantan tekston de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies dua eldono ĵus aperis.

Vi pagas nur la sendokostojn: por 25 ekz. 2 int. respondkuponojn (0,90 gld); por 50 ekz. 4 rpk.; por 100 ekz. 6 rpk.; por 200 ekz. 8 rpk.

Mendu ĉe la Centra Oficejo de UEA

POR LA JARFINA SEZONO

Serio de 6 bondezirokartoj "MONDFAMAJ PENTRAĴOJ" (Rembrandt, Da Vinci, Breughel, Renoir, Van Gogh, Utrillo), duoblaj kartoj, kun kovertoj.

Prezo: 3,75 gld.; 15 steloj

Serio de diversaj Novjarkartoj "ORA JARCENTO HOLANDA" (Rembrandt k.a.), poŝtkartoj.

Prezo: 1,50 gld., 6 steloj

Mendu tuj ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

Okaze de la 100-jara datreveno de la morto de
la aŭtoro, baldaŭ aperos

LA SPLENO DE PARIS

prozpoemaro de

Charles Baudelaire

akompana volumo al

"La floroj de l' malbono"

N-ro 8 en la prestiĝa

SERIO ORIENTO-OKCIDENTO

Ĉ. 150 paĝoj en formato 21 x 15 cm., bindita
per artefarita led, kun ora surpriso kaj
presita polvo -ŝirmilo kaj
kun kvar ilustraĵoj.

Prezo: 12,50 gld. (50 steloj)

Eldonas: **KOKO**

Mendu ĉe: **UEA**

IMPERATIVOJ DE LA VIVO

de

H. Rohden

Kristana orientigo por la ĉiutaga vivo.

La aŭtoro parolas al la tuta kristanaro pri la
regno de la ĉielo.

Libro nepre legenda de ĉiu esperantisto.

Prezo unu dolaro aŭ egalvaloro.

Mendebla ĉe la Libro-Servo de U.E.A. aŭ

LIVRARIA SABEDORIA

Rua Senador Dantas, 117-E

Rio de Janeiro - Brazilo

4a EŬROPA PASKA RENKONTIĜO DE LA ESPERANTA JUNULARO

39a ITALA KONGRESO DE ESPERANTO

Montecatini Terme (Italujo)

10 - 16an de Aprilo 1968

La Pistoja Esperanto-Grupo, kunlabore kun la
Provinca Turisma Entrepreno kaj aliaj lokaj
publikaj instancoj, starigis, okaze de la supre-
diritaj manifestacioj, la sekvantajn konkursojn:

1) Literatura Internacia

Konkurso en Esperanto

2) Jurnalista Internacia

Konkurso en Nacia Lingvo

3) Jurnalista Internacia

Konkurso en Esperanto

Inter la multaj kaj interesaj premioj estos
senpagaj restadoj en Montecatini dum 6 aŭ 12
tagoj.

Petu informojn, sendante respond-kuponon, al:

PISTOJA ESPERANTO-GRUPO

ĈE ENTE PROVINCIALE TURISMO

Corso Gramsci n° 110 51100 PISTOIA (Italujo)
Krom la informoj Vi ricevos, senpage, ankaŭ
cirkuleron pri italaj esperantistaj manifestacioj
kaj interesan kvinlingvan mapon de Pistoja
Provinco.

Ole Ramby :

Novaĵo !

NATURA NUTRADO

Jus aperis tiu 14-paĝa broŝuro tradukita el la
dana de **Betty Larsen**. Kun bele ilustrita
kovrilo.

Natura nutrado estas rimedo por regenerado
de la organismo. Ĝi helpas konservi vian sanon.

La broŝuro kostas \$ 0.25 (Fr.Fr. 1.20) aŭ ekviva-
lento.

Ĉe SAT, 67 av. Gambetta, Paris-20 (poŝtkonto
1234.22 Paris) aŭ ĉe via Libroservo.

